

# LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTO-  
RÖRELSEN I SVERIGE

UTGIVEN AV GEFLE  
ESPERANTOFÖRENING

Officiellt organ för Svenska Esperanto-Förbundet (S. E. F.)

N:o 11.  
November 1914.

Redaktör:  
**R. PEHRSSON**  
Kraftverket, Älvkarleö.

Ansvarig utgivare:  
**W. WAHLUND**  
Gävle.

Lösnummer 10 öre.  
Årsprenumeration 1:20 kr.  
Annonspris 5 öre pr mm.

## Esperantos egenskaper.

Man kan för att visa det berättigade i ett »världsspråks» införande framdraga en nästan obegränsad mängd olika motiv, beroende på ur vilka synpunkter man betraktar frågan. Men i praktiken är det dock endast en sak varpå avgörandet hänger, nämligen det ifrågavarande språkets egenskaper. Endast ett av största möjliga enkelhet och fulländning kännetecknat språk har utsikt att lösa frågan. I sin raffinerade enkelhet har Esperanto sin största styrka.

För att till fullo uppskatta esperantos egenskaper är det nödvändigt, liksom förhållandet är vid varje annat språk, att lära sig och använda det. En efter en flyktig granskning av grammatik och ordbok lämnad kritik är ur praktisk synpunkt värdelös. Ty en sådan bedömning förestavas vanligen av någon uppkonstruerad svårighet eller någon pedantisk teori, som då språket togs i praktisk användning, genast av sig själv faller till marken. En mängd egenskaper som nybörjaren aldrig drömt om, framtråda för honom när han börjar begagna språket. Han finner, att det icke är något vanligt språk detta, utan att för vilket ändamål det än må användas, skall det på ett anmärkningsvärt sätt uppfylla de fordringar som ställas på det.

Skarpast framträdande är den lätthet, varmed esperanto kan läras. Vid betraktande av denna sida av språket vilja vi lämna obeaktad betydelsen av det stora antal ordrötter som redan äro kända för nybörja-

ren, ty under det de i hög grad underlätta studiet för en europé, hava de ingen betydelse för t. ex. asiater. Det har emellertid visat sig, att japaner, kineser och indier med lätthet kunna lära sig Esperanto. (Erfarenheten har givit vid handen, att de för att lära sig Esperanto behöva endast ungefär en femtedel av den tid, som erfordras för t. ex. engelska.)

Bland hemligheterna till esperantos framgång märkas först och främst följande:

1. Inga undantag givas från reglerna.
2. Uttalet är utomordentligt lätt.
3. Orden stavas ljudenligt.
4. Alla vokaler äro teoretiskt »halvlånga», så att alla möjligheter till olika uttal härigenom äro utslutna.

5. Substantiv, adjektiv och verb kunna genast igenkännas såsom sådana genom sina ändelser.

6. Alla verb böjas lika och på enklaste möjliga sätt.

7. Ordföljden är ligkiltig.

8. Antalet ordrötter att inlära är jämfört med andra språk mycket litet, genom att alla andra ord bildas av dessa genom för- och efterstavelser.

Det är nästan något ofattligt detta, att i sexton korta regler kunna sammanfatta hela språkets grammatik, då man tänker på de vidlyftiga läroböcker som användas för inlärandet av andra språk. De enda fordringarna för att riktigt tala och skriva esperanto är grammatikalisk noggrannhet parad med litet sunt förnuft. Det finnes inga nationella uttryck eller idiom i esperanto, såsom har antagits av sådana som ej känna till språket och det faktum att esperantister av

alla nationaliteter så lätt ansluta sig till de fastställda normerna belysa på ett slående sätt hjälpspråkets praktiska och logiska egenskaper.

Ett synnerligen viktigt drag hos Esperanto är dess logiska klarhet och precision i uttrycket. Häruti överträffar det vida de nationella språken, beroende på dess regelbundna byggnad, och det är en vanlig erfarenhet hos esperantister att genast veta huru exakt uttrycka en idé på Esperanto, men att i sitt modersmål vara tvungna tillgripa mindre noggranna ord eller en omskrivning.

Forts.



## Se ne polurita, diamant'.

Poemo verkita de la mortinta japana impericestrino, tradukita el la japana lingvo de K. Ossaka, Tokio.

Ne havus, se ne polurita,  
la belan brilon diamant',  
nur homoj povas instruitaj  
la virtojn montri en malvant'.

Se lernos per irad' horloĝa  
senĉese ni en energi'  
ne eĉ minuton ekhaltante  
ajn kian celon trafos ni.

Facile akvo sin alformas  
laŭ ĉia form de sia uj',  
ŝanĝigas same laŭ kunuloj  
la homo karakter' ja tuj.

Amikojn tenu nur ŝatindajn  
por ke vi povu en sincer'  
helpate kaj helpante ĉiam  
kunvoji en serĉad' de ver'.

El »Orienta Azio».

## Atlantis.

Fragmentoj de la konferenco, farita la 20 de novembro 1912 ĉe Oceanografia Instituto en Paris, de s-ro Pierre Farmier, membro de la franca Akademio de Sciencoj, direktoro de la Oficejo por geologia karto de Franclando. Laŭ »Scienca Gazeto».

Malluma poemo estas tiu de Atlantis, mirinde konciza kaj simpla en du dialogoj de Platon, kiam oni legis ĝin, oni komprenas, kial la tuta Antikvo kaj la tuta Mezepoko de Sokrates ĝis Kolumbo donis la nomon Malluma Maro al la oceana regiono, kiu estis la teatro de tiel terurega kataklismo. Oni ĝin sentis, tiun maron, plena je krimoj kaj minacoj, pli sovaĝe kruela, ol ĉiu ajn alia. Post la vojaĝo de Kolumbo malaperas la teruro, restas scivolemo. La geografoj kaj historiistoj, klinitaj super la abismo, serĉas por difini precizan lokon de la submariĝinta insulo, sed, nenie trovinte indikon, ili dubas pri Platon, opiniante, ke tiu geniulo kredeble kreis tutpece la fabelon aŭ ke li prenis por tre vastega insulo parton de Maŭritanio aŭ Senegambio aŭ de la nordo de Eŭropo. Solaj poetoj restis fidelaj al la bela legendo kaj, kredeble, ili estas pravaj unufojon plie.

Post longa periodo de malŝata indiferenteco, ĵen, depost kelke da jaroj, la scienco revenas al Atlantis. Kelkaj geologoj kaj zoologoj nun sin demandas ĉu Platon ne transdonis, apenaŭ pliigante ĝin, unu eron de la reala homara historio. En liaj dialogoj unu el interparolantoj rakontas pri Solon kaj lia vojaĝo en Egipto, kie en urbo Sais malĵuna pastro konigas al li, laŭ la sanktaj egiptaj libroj, la historion de Atenoj.

»Antaŭ 9000 jaroj ekzistis trans la markolo, kiun vi nomas Herkulesaj Kolonoj, insulo pli granda ol Libio kaj Azio. El tiu insulo oni povis facile iri sur aliajn insulojn kaj el tiuj sur la tutan kontinenton, kiu ĉirkaŭas Internan Maron. En insulo Atlantis regis reĝoj mirinde potencaj. Ili havis sub sia superpotenco la tutan insulon kaj ankaŭ pliajn aliajn insulojn kaj kelkajn partojn de la kontinento. Ili ankaŭ regis super Libio ĝis Egipto kaj super Eŭropo ĝis Tirenio. Tiu tuta potenco iun tagon kuniĝis por mal-liberigi per unu frapo nian landon,

la vian kaj ĉiujn popolojn, vivantajn sur tiu ĉi flanko de la markolo. Tiam Atenoj sole kontraŭstaris la teruregan danĝeron, haltigis la invadon, kunamasigis venkojn sur venkoj. Pli poste grandaj tertremoj kaj superakvegoj subakvigis en unu tago kaj unu fatala nokto ĉion, kio estis viaj militistoj. La insulo Atlantis malaperis sub la maro. Depost tiu tempo la maro en tiuj regionoj fariĝis netrairebla; la ŝipoj ne povas veturi tie pro la sabloj, kiuj kuŝas sur la loko de la enabismiginta insulo.»

En alia dialogo ni legas la prikskribon de Atlantis:

»Ebenajo, kuŝanta apud la maro kaj la plej multproduktema el la ebenajoj; ĉirkaŭ ĝi staras rondo de montoj sternigantaj ĝis la maro, rondo malfermita al la sudo kaj ŝirmanta la ebenajon kontraŭ malvarmegaj blovoj de la nordo; en tiuj belegaj montoj multaj vilaĝoj, riĉaj kaj multhavantaj homoj; sur la ebenajo belega urbo, kies palacoj kaj temploj estas konstruitaj el ŝtonoj de tri koloroj: blanka, nigra kaj ruĝa, eltiritaj el la insulo mem; ĉi tie kaj tie minejoj, produktantaj ĉiujn metalojn utilajn al la homo; fine la bordoj de l' insulo krute tranĉitaj kaj alte suprenstarantaj la maltrankvilan maron.»

Jen iom mallongigita rakonto, kiu tute ne havas ŝajnecon de fabelo, sed precizecon preskaŭ scienca. Nun ni vidu, kion diras la scienco.

Ni imagu unumomente, ke ni povis tute malplenigi, senakvigi la oceanon kaj, farinte tion, ni rigardu elalte la reliefon de ĝia fundo. Ni vidus du grandegajn kavajojn, du vastegajn valojn, kuŝantajn de la sudo al la nordo, paralele je la du marbordoj kaj apartigitaj unu de la alia, de meza regiono pli alta. La okcidenta valo, kuŝanta laŭlonge de la amerika marbordo, estas pli larĝa kaj pli profunda: ĝi enhavas kelke da kavajoj, aspektantaj kiel truoj aŭ funeloj, kies profundo atingas pli ol 6000 m kaj ankaŭ kelke da maloftaj kvazaŭkolonoj (unu el ili estas Bermudoj), kiuj el la fundo de l' abismo suprenstaras al la ĉielo. La orienta valo, laŭlonge de la eŭropa kaj afrika bordo, estas pli mallarĝa, malpli profunda, sed pli sulkiginta kaj multaj kvazaŭpiramidoj, unuj maldikaj, kiel tiu de Madero, aliaj masivaj, kiel tiuj, kiuj portas insulojn Kanariajn kaj de Verda Kapo, staras ĉi tie kaj meze de la valo aŭ apud ĝia orienta bordo. La meza pli alta regiono

aspektas kiel longa promontoro, kies akso koincidas kun la akso de la atlantika abismo mem, kaj kiu, komencante je Grenlando, prenas en sian mason Islandon kaj nordajn insulojn, sterniĝas mallarĝigante al la sudo kaj finiĝas pinte je la 70° de suda latitudo. En pli granda parto de sia longo ĝi havas mezan larĝon de ĉirkaŭ 1500 kilometroj. Tute neregula ĝia supraĵo estas tre sulkigita, plena je elstarajoj, kribita de kavajoj, precipe en la regiono de ins. Azoraj, kiuj estas la suproj de ĝiaj plej altaj elstarajoj.

Nun ni atentu, kion diras geologio. Same kiel la okulo de pentristo vidas vastan aron da koloroj kaj lumajoj ne suspektitaj de aliaj homoj, la okulo de geologo estas impresata de tre malklaraj, tre malprecizaj lumoj, kiuj lumigas al li sola la mallumon de l' abismoj kaj ankoraŭ pli nigran mallumon de malproksimaj estintaĵoj. Kaj lia orelo, impresigema, kiel tiu de muzikisto, vibras ĉe mallaitaĵoj, ĉe sopiroj, kiuj elvenas el la interno de la planedo aŭ el profundajoj de la historio, kaj kiujn la plimulto da homoj konsideras kiel absolutan silenton.

Jen unua fakto: La orienta regiono de Atlantika oceano estas, laŭ tuta sia longo, kredeble de unu poluso ĝis la dua, vasta vulkana regiono. En la kavajo, kiu kuŝas laŭlonge de la eŭropa kaj afrika bordo, kaj en la orienta parto de la pli altabedo, kiu kuŝas ĉe la mezo de l' oceano, vulkanoj estas multegaj. Ĝiuj elstarajoj, atingantaj tie la suprajon de l' maro, estas insuloj vulkandevenaj aŭ portantaj vulkanojn. Insuloj Gouth, Tristan de Cunha, S.-Helena, Ascension, de Verda-kapo, Kanariaj, Madero kun la apudaj, Azoroj, Islando, Jean-Mayen estas tute aŭ plej grandparte formitaj el lafoj. Oni konstatis en 1838 jaro ekziston de submara vulkano sur ekvatoro, je 22° de okcidenta longitudo, tio estas sur la linio, kiu ligas ins. Ascanasion kun insularo de Verda-Kapo. En la insuloj, ĉi supre nomitaj, multaj vulkanoj estas nun aktivaj; tiuj kiuj estingiĝis, ŝajnas estingiĝintaj depost malmulte da tempo; ĉie tertremoj estas oftaj; ĉi tie kaj tie insuloj subite eliras el la maro aŭ rifoj delonge konataj malaperas. La persisteco de tiuj fenomenoj, kaŝata de la oceano, por la geologo, estas senduba. Dum la kontinentaj bordoj de Atlantiko nun ŝajnas senmovaj, ĝia fundo moviĝas laŭ sia

tuta orienta zono, larĝa ĉirkaŭe 3000 klm., kiu samtempe entenas ĉiujn supre nomitajn insulojn. Tie, aktuale, estas moviĝema regiono de la supraĵo de la planedo kaj en tiu regiono la plej teruraj kataklismoj ĉiumomente povas okazi.

Tre certe jam okazis iuj. En 1898 j. ŝipo instalas submaran telegrafan kablaron, kiu kunligas Brest kun Kapo-Cos. Je 47° de norda latitudo kaj 29° 40' de longitudo okcidente de Paris, ĉirkaŭe 900 klm. norde de ins. Azoraj, la kablo rompiĝis kaj oni penis rekapti ĝin per skrapiloj. La meza profundo estis proksimume 3100 m. Oni konstatis tion: la fundo de l' maro tie havas karakteron de monta lando kun oftaj rokaj suproj, krutaj deklivoj profundaj valoj. La skrapilo trenata sur tiu tre malglata supraĵo konstante kroĉiĝis al rokoj kun malmolaj pintoj kaj akraj anguloj; ĝi preskaŭ ĉiam revenis tordita aŭ rompita. Plufoje oni trovis interdentoj de la skrapilo malgrandajn mineralajn pecetojn, kiuj, laŭ unu-animia opinio de inĝenieroj, ĉeestintajn tiun skrapadon, estis ĵus elrompitaj el rudaĵ rokoj de la fundo. Ĉiuj ĉi pecetoj estis samspecaj, el vitreca lafo, nomata *takilito*. Tia lafo, tute vitreca povis soldigi en tiun staton nur en libera aero. La plej freŝaj studadoj lasas nenian dubon pri tio, ke sub premo de pluraj atmosferoj, eĉ sub malmulte dika tavolo el rokaĵoj antaŭe soldigitaj, kaj des pli sub premo de 3000 m. da akvo tiu lafo kristaliĝas aspektus formita el interplektitaj kristaloj, anstataŭ konsistis nur el kaloida materio. La fundo do de Atlantiko, je 900 klm. norde de Azoroj estis kovritaj de lafoj, kiam ĝi estis ankoraŭ ekstermara. Sekve, ĝi fundenfalis, malproksimiĝante ĝis 3000 m., kaj tial, ke rokoj konservis sian formon sulkiĝintan, siajn akrajn malglataĵojn, akrajn angulojn de lafaj fluajoj, necese estas, ke la fundofalo sekvu tre proksime la eliron de la lafo kaj, ke ĝi estu subita. Se ne estus tiel, la atmosfera eruzio kaj mara skrapado malaperigus la malglataĵojn, ebenigus la tutan supraĵon.

Ni daŭrigu la rezonadon: Ni estas ĉi tie sur la linio, kiu kunligas Islandon kun Azoroj, meze de vulkana regiono de Atlantiko, meze de regiono de aktuala moviĝemeco, nastabileco kaj vulkaneco. El tio necesa konkludo: tuta regiono norde de Azoroj, enhavanta eble ilin mem kaj kies ruinoj, en tiu okazo, nur estas ĉi tiuj insuloj, fundenfalis en ne tre

malproksima tempo, kredeble en epoko, kiun la geologoj nomas aktuala.

Jen ankoraŭ aliaj faktoj. La atlantika abismo preskaŭ tute ŝajnas esti el relative freŝa dato kaj la fundenfalo de la azora regiono estis aliaj fundenfaloj kies vasteco konfuzas imagon. Depost kiam Eduardo Suesse kaj Marcelo Bertrand instruis al ni la manierojn rigardi la terglobon kaj deĉifri rapidajn aŭ malrapidajn aliformiĝojn de ĝia aspekto tra multnombraj jarcentoj, ni akiris certecon pri ekzisto de tre malnova kontinenta kunligo inter Eŭropo kaj Norda Ameriko, kaj de alia kontinenta kunligo, ankaŭ tre malnova, inter Afriko kaj suda Ameriko. Inter ĉi tiuj kontinentoj, la norda kaj la suda, troviĝis la mediteranea kavajo, tiu antikva mara sulko, kun konstante varianta larĝeco, kiu formis kvazaŭ skarpon ĉirkaŭ la tero kaj kiun ni ankoraŭ vidas tiel profunde markitan en unua mediteraneo, Maro de Antiloj kaj Maro de Sundo.

La konoj liveritaj de geologio estas tiaj: treega moviĝemeco de la atlantika regiono, precipe ĉe la kunrenkontiĝo de la mediteranea kavajo kun la granda vulkana regiono, kiu kuŝas de la sudo al la nordo en orienta duono de la nuna oceano; certeco, ke okazis vastegaj fundenfaloj, dum kiuj insuloj kaj eĉ kontinentoj malaperis; certeco, ke kelkaj el tiuj fundenfaloj datumas de nemalproksime, estas en la kvaternaria epoko kaj ke, sekve, ili povis esti vidataj de la homo; certeco, ke iuj estis subitaj aŭ almenaŭ rapidaj. Geologie la rakonto de Platon estas treege verŝajna.

Ni nun demandu la zoologojn. Juna franca scienculo s-ro Luis Germain post studado de nuna tera faŭno de la kvar insularoj: Azoroj, Madero, Kanariaj kaj de Verda-Kapo konvinkiĝis pri nepre kontinenta origino de tiu faŭno; li eĉ elmontras multajn indikojn de adoptiĝo al la dezerta vivo. Kvaternariaj formacioj de Kanarioj similas al tiuj de Maŭritanio kaj enhavas la samajn specojn de moluskoj. Eĉ inter nunaj moluskoj de la kvar insularoj estas specoj kiuj ŝajnas esti postvivantoj de fosiliaj specoj de eŭropa terciaro. Similaj postvivantoj ankaŭ ekzistas inter la kreskajaro, nome, unu speco de filiko. El ĉi tiuj faktoj kaj el stranga geografia disloĝado de unu speco de pulmaj moluskoj s-ro Germain deduktas la kunligon, ĝis pliocena tempo, de la kontinento, kiu entenis

la kvar insularojn, kun Iberia duoninsulo kaj Afriko, kaj vastiĝon de tiu kontinento, dum la komenco de mioceno, ĝis Antiloj.

Estas preskaŭ absoluta kunrespondeco de ĉi tiuj zoologiaj konkludoj kun tiuj, kiujn liveris al ni geologio. Kaj kiu nun povus antaŭ tiel plena kunrespondeco, fundamentita sur tiel malsamaj argumentoj, ankoraŭ dubi pri la konserviĝo ĝis epoko tre proksima al ni de vastaj ekstermaraj teroj en la parto de l' oceano, kiu estas okcidente de Herkulesaj Kolonoj? La restaĵo de ĉi tiuj teroj estis Atlantis, mirinda insulo, apartigita de la kontinento, kun ĉeno de aliaj pli malgrandaj insuloj. Pri la kataklismo oni ne povas dubi. Nur unu sola demando estas ankoraŭ solvota: ĉu tiam ekzistis homoj, kiuj povis suferi ĝian frapon kaj transdoni la memorajojn. Mi ne opinias, ke ĝi estas ne solvebla, sed ŝajnas al mi, ke nek geologio, nek zoologio solvas ĝin. Tiuj du sciencoj, ŝajnas al mi, liveris ĉion, kion ili povis diri. El antropologio, etnografio kaj oceanografio ni nun atendu la definitivan respondon.

Tiom diris s-ro Termier kaj al ĉi tiuj vortoj de la eminenta scienculo ni aldonas mallongan sciigon. En 1912 j. aperis en gazeto »New-York World« la rakonto pri Atlantis ripetita de kelkaj eŭropaj gazetoj kaj inter ili de »Esperanto« (1913 *M.M.* 5—6). Laŭ tio rakonto fama arĥeologo Henrico Schliemann, elfosinto de Troja, trovis tie senperajn pruvojn de la ekzisto de Atlantis kaj de Atlantianoj. Tamen, ĉar la pruvoj ne estis sufiĉe ekzamenitaj, li gardis ilin sekrete kaj heredigis al sia nevo d-ro Paŭlo Schliemann, kiu, ankoraŭ sekrete kaj tute izolite, daŭrigis la esplorojn de sia onklo kaj sukcesis kolekti multajn pruvojn, kiu certigas ne nur la ekziston de la loĝantaro de Atlantis, sed ankaŭ ĝian tiel altan civilizacion, ke oni rajtas opinii ĝin la kerno, el kiu naskiĝis ĉiuj de ni konataj civilizacioj de la antikvo en Malnova kaj Nova mondo. Sian severe garditan sekreton s-ro Paŭlo S. publikigis en supre nomita usona gazeto en formo de ĝenerala provizora skizo. La rakonto estas treege interesa kaj alloga, sed ĉu la profanulo povas krei al si ĝustan opinion pri la vera signifo de tiuj sekretaj esploroj, pruvoj, konkludoj? Certe ne. Sekve, oni atendu kredi aŭ malkredi, ĝis kiam sciencaj aŭtoritatoj ekzamenos la aferon kaj diros sian vorton.

El Pola Esperantisto.

J. Ch.

## Sveda Kroniko.

### Gävle.

La 3-an de nov. la Esperantista Klubo de Gävle havis sian monatan kunsidon kun festeto. La festo, en kiu partoprenis 45 personoj, sukcesis bone. El la amuzoj ni povas citi deklamadon, kantadon k. t. p.

Esperantan kurson ni ankaŭ komencis kun 41 partoprenantoj. La kurso, kiu estas gvidata de nia samideano, kolegia adjunkto E. Beckman, ŝajnas esti unu el la plej sukcesplenaj ĝis nun. Dum la aŭtuno multe da rusoj travojaĝis nian urbon; inter ili multajn esperantistojn kaj tial ke da polica estro donis al la esperanta klubo permeson havi tri riprezentantojn ĉe la vaporŝipoj, portante brakorubandojn, sur kiuj estas presita »Esperanto», tio vekis grandan intereson por nia lingvo en Gävle. Krome la ĉefa gazeto de nia urbo »Gefle Dagblad» ĉiun dekkvaran tagon enpresas raportojn kaj propagandajn artikolojn pri nia lingvo. Ni ankaŭ proponas al la aliurbaj esperantistoj propagandi ĉe la ĵurnalistoj por ricevi esperantan fakon en la gazetoj.

*Eran.*

### Malmö.

La esperantista klubo en Malmö energie daŭrigas sian propagandon. Kvankam la klubo estas nun iomete malgranda, ni esperas, ke la nombro de la membroj baldaŭ pligrandiĝos. Novaj kursoj estas aranĝitaj:

1. por la klubanoj.
2. ĉe la popola lernejo.
3. por la komercistoj.

La klubo posedas tre plenan bibliotekon.

*J. P.*

### Stockholm.

»Verda Stelo» en Stockholm havis sian unuan kunvenon por la vintra sezono la 30-an de Oktobro. La kunveno okazis en la ordinara klubo kaj estis sufiĉe vizitata. Estis diskutata, krom kelkaj internaj aferoj, ankaŭ la publika agado de la klubo. Oni decidis aranĝi novajn kursojn, publikajn paroladojn etc. Spite de la milito, la intereso por *Esperanto* estas kreskanta en la ĉefurbo, kaj la klubo fervore propagandos la lingvon. La klubo sukcesis oficiale enkonduki Esperanton en la programon de »Birkagården»,

grava kultura asocio en Stockholm. La unuan kurson en tiu signifoplena asocio nun talente gvidas nia konata samideano, John Johansson. Baldaŭ okazos ankaŭ en »Birkagården» publika parolado en *Esperanto* (kun kolorigitaj lumbildoj) pri la kulturaj trezoroj en Praha, Bruselo kaj Parizo. Tiun paroladon faros la sekretario de la klubo, Teodor Rosengren. Dum la somero neniun membro tute sukcesis eniri la unuan gradon de »Verda Stelo». En la *duan* eniris fino Berta Lindeberg, en la *kvaran* gradon s-ro Gutke per sia brila ekzameno: »La ŝtonjetado». Okaze de la nuna milita stato, la klubo povis saluti kaj helpi multajn alilandajn esperantistojn, precipe rusojn. Per nia deligito J. Johanson lastatempe jenaj samideanoj estas akceptitaj de »Verda Stelo»: S-roj Adam Zakizewski (Varsovio), Alexandro Mikli (Reval), Petroffsky (Petrogrado), Markuze (Moskva), Kolĉin (Del. U. E. A., Samara), K. M. Rakamsgi kaj J. L. Politiëff (Petrogrado), Buseth (Trondhjem), Fr Kopf (Kaliŝo, Polujo), F-ino Kandy (London), D-ro kun edzino Essigman (Varsovio), Romanos Brandt, profesoro ĉe la universitato en Moskva k. a. Ofte okazis, ke la fremdlandaj esperantistoj por la klubanoj detale priparolis siajn aventurojn k. t. p. En la lasta kunveno propono ankaŭ estis farita, ke »Verda Stelo» eniru Svedan Esperanto-Federacion. Tiu propono estis malaprobata. La klubo ne povas, pro sia *internacia* karaktero, eniri ian nacian korporacion. La kunveno tamen esprimis la deziron, ke kiel eble plej multe de la klubanoj private aliĝu kaj apogu la oficialan organon *La Espero*. Post la klubkunveno okazis interesa diskuto en Esperanto pri »la elementaj postuloj» por sukcese instrui nian lingvon al infanetoj en la unuaj klasoj de la popollernejo. Je la fino de la kunveno okazis balo en kiu 200 personoj partoprenis.

*Teka.*



»Vi skola visa vorlden, att ömse-sidig förståelse mellan personer av olika nationer mycket väl kan upp-nås.»

*L. L. Zamenhof.*

## Giver Esperanto redan nu någon praktisk fördel?

En tysk esperantist, Henry Meyer skriver i Chileesperantotidningen »La du Steloj» angående sina erfarenheter av esperantospråkets nytta följande:

Man hör ofta sägas att Esperanto hittills lämnat endast idéell och ingen praktisk nytta. Från min ettåriga resa i Sydamerika, från vilken jag nyligen återkommit kan jag berätta motsatsen.

Knappast hade jag lärt mig Esperanto, förrän jag två gånger blev tilltalad i Ost-Preussen av främlingar vilka sågo min gröna stjärna. Sedan kom jag till Paris. På Eiffeltornet var det en vykortsförsäljning. När säljaren fick se Esperantomärket avbröt han genast sitt franska tal och fortsatte att bjuda ut sina varor på Esperanto. Naturligtvis köpte jag då. Samma afton åt jag på ett hotell. En dam som gick förbi mitt bord, frågade mig på franska om jag talade Esperanto, och naturligtvis svarade jag på Esperanto. Efter fem minuter var jag presenterad för hennes make, en aktningvärd herre, och vi tre sutto tillsammans till sena natten utan att tänka på tiden. Det var angenäma timmar.

Men den största nyttan av Esperanto hade jag under min långa vistelse i Chile. Snart fick jag vänner och bekanta, vilka intresserade sig för mig och hjälpte mig på alla sätt. När jag ville besöka grannstaden Santiago, skrev jag endast till Esperantoföreningen därstädes, som då sände en stjärnbärande representant till stationen, vilken visade mig alla stadens sevärdheter. Föreningen inbjöd mig till en av sina stora fester, jag blev god vän och bekant med många medlemmar och jag kan uppriktigt säga, att mina angenämaste dagar i Chile fick jag genom Esperanto.

I Rio de Janeiro ville jag köpa en bok. Bokhandlaren bar Esperantostjärnan och jag behövde således icke visa min okunnighet i portugisiska språket. Han följde mig genast till »Universala Esperanto Asocios» konsul, som åkte tillsammans med mig genom den vackra staden och visade mig sevärdheter, vilka jag utan hans hjälp ingalunda fått se. Belastad med esperanto-

saker och vackra minnen från Amerika, återvände jag tacksam för Esperanto till Europa.

I Liverpool fann jag samma hjärtliga mottagande och jag har nu den glädjen njuta av det i London.

Till och med om jag icke hade något idéellt intresse för Esperanto, skulle jag dock förbli Esperantist för dess redan nu visade praktiska nytta.

*Henry Meyer.*

Översatt av *E. Adamson.*



## Letero al ŝi.

Mi kuŝis ĉe via brusto kaj songis — vi aŭdu la songon.

La temple de La Ĉiobonulo sur la tero estis skandalita de diabloj en homoenkarniĝo. Ili dancis sur difektitaj homkorpoj kaj kadavroj de senhonorigitaj virinoj, kaj ili oferis senkulpajn infanojn al la honoro de la dio de la milito. Nokto estis super la tero, sed ni vidis stelon. Estis la stelo de la espero, kaj tiu stelo sciigis novan tagon, ni pensis.


»Venu, eniru mian kaleŝon, mi direktas ĝin al la lando de la matena ruĝo,» mi diris al vi. Kaj ni veturis en granda rapideco kaj venis al alia mondo, kie ekzistas nek milito, nek diskuto pri malgrandajoj. La kampoj de la nova lando kuŝis freŝaj kaj rosigitaj kaj ni deprenis de ni la ŝuojn, ĉar ni ne volis difekti la belan herbaron kun koto el la mondo, kiun ni forlasis.

Ni iris antaŭen kaj ni baldaŭ vidis aron da ruĝaj dometoj, ĉiuj ĉirkaŭitaj de verda aŭ blanka barilo kaj en ĉiu korto ni vidis plugilon, erpilon kaj fosilon.

Estas vespero nun, kaj la homoj en tiu lando plej kredeble iris por dormi, ni pensis. Sed subite ni aŭdis kantadon el la arbaro, kiu montris sin je nia flanko. Ni iris tien kaj vidis tie belajn gejunulojn, kiuj ludis sur herboplaco. Inter la arbotrunkoj en la arbaro sidis blankharaj maljunaj viroj kaj virinoj. Ni komencis interparoli kun ili, kaj ili diris al ni, ke ilia lando estas la hejmo de la ĝojo kaj la feliĉo, ĉar tie ne ekzistas armiloj, nur fosiloj, plugiloj kaj erpiloj.

Laŭ la sveda  
*E. Adamson.*

## Esperantistoj:



W. Wahlund, Gävle.

Nia supre bildita fervora Gävle-a samideano estas plej konata al la sveda esperantistaro kiel responda eldonisto por tiu ĉi gazeto. Ĝis nun li tamen tute ne estis iom ajn ĝenita de la juĝista departemento kaj ni esperas, ke li ankaŭ estas certa por la estonteco. Kaj kiam la aŭtoritatoj ĝis nun ne atakis nian lingvon, ni povas esperi, ke ili pli kaj pli estos interesataj de ĝi kaj ili do ne volas ataki aferon, kiu interesas ilin. Kompreneble nenio atakebla estis trovebla en nia gazeto dank' al la atento de la redaktoro.

Sed nun ion pli pri la »respondulo»; li apartenas al la plej interesataj svedaj esperantistoj kaj ofte li faris gravajn aferojn por la sukcesigo de la mondlingvo.

Satata, kiel li estas de ni ĉiuj, li estas elektita vic-prezidanto de la »Sveda Esperanta Federacio» kaj krom tio li estas ankaŭ kasisto de la klubo esperantista de Gävle, kiu okupo postulas fortan volon kaj grandan intereson. Neniu al kiu mankas la intereso estus kapabla prizorgi ĝin, precipe nun, kiam li samtempe devas esti ekonomia estro por »La Espero». Estas cetere plejparte la merito de lia kuraĝa iniciatemo kaj energio, ke »La Espero» estis fondata antaŭ baldaŭ du jaroj. Komercisto en la reala vivo, li ne eraris multe, kiam li kalkulis pri la ekzisteblecoj de nia gazeto kaj eĉ ne palpebrumante li akceptas la grandajn fakturojn por la presado de ĝi. Kiel vera heroo kredas je la venko, tiel ankaŭ s-ro Wahlund

fidas, ke la abonantaro de »La Espero» ĉiam plu plimultiĝos kaj pli trankvilaj ekonomiaj tempoj venos ankaŭ por nia gazeto. Dankon, kara samideano, pro via granda laboro!

*E. A.*



## Uttalanden om Esperanto.

### IV.

*Alfred H. Fried, Wien, Nobelpristagare år 1911.*

»Den första frågan<sup>1)</sup> synes mig redan otidsenlig. Att förneka nödvändigheten och möjligheten av ett internationellt språk är omöjligt för varje människa, som följer med sin tid. Man måste svara med en motfråga: vad skall man tänka om en människa, som icke tror på idén om ett internationellt hjälpspråk? Jag är sedan 12 år tillbaka av den orubbliga övertygelsen, att genom Esperantospråket är problemet om det internationella hjälpspråket fullständigt löst. Det är möjligt, att man kan göra esperanto ännu bättre, jag är även redan övertygad om att man redan förbättrat det, men här är verkligen det bättre det godas fiende. Det är icke fråga om att äga det allra fullkomligaste redskapet, utan ett som alla intresserade använda på samma sätt. Om vi giva de »förbättrade» systemen ett högre existensberättigande, så skaka vi därmed hela problemets grund. Som ingenting är fullkomligt här på jorden, skall på det förbättrade systemet följa ett ännu mer förbättrat, och vi skola få se den byloniska språkförbistringen tränga in just där vi i kulturens intresse sökte undanröjda den. Esperanto är i dag icke blott det förnuftigaste internationella hjälpspråket utan även det mest utbredda; härför måste hela världsspråksrörelsen koncentrera sig på detta enda mål — esperantos allmänna antagande.

Hade man lika lätt för att uppskatta de andliga framstegen, som

<sup>1)</sup> Uttalandet utgör svar på en av tyska esperanto-förb. framställd rundfråga, vari först frågas: Vad är Eder åsikt om idén om ett internationellt hjälpspråk.

Ur »Das Esperanto ein Kulturfaktor,» 3

fallet är med de tekniska, så vore denna rundfråga överflödigt. Zeppelin höll man endast så länge för en narr, tills man hade hans uppfinning synbar, obestriddig, verklig framför sig. På Zamenhofs uppfinning vill man allt fortfarande icke tro, helt enkelt av den orsaken, att man icke har den så påtaglig framför sig som det förbiflygande luftskeppet. Man måste övertyga sig om den, pröva den, studera dess möjligheter. Det gör emellertid icke massan. Gjorde den det, skulle den inse, att Zamenhofs uppfinning icke är mindre genialisk än greve Zeppelins, att den icke är mindre användbar; ja kanske ännu användbarare och att den redan på ett överraskande sätt kommit till användning över hela jordklotet. Allt detta erkännes blott icke i den omfattning som fordras för det fulla utnyttjandet av detta underbara faktum. Krigsministerierna, dessa den tekniska utvecklingens moderna mäcenater hava för närvarande intet intresse för ett sådant medel till internationell förståelse. Av denna orsak borde det vara en intelligensens hedersplikt att förhjälpa Zamenhofs internationella hjälpspråk till seger »

## V.

*Patrick Geddes*, professor i botanik vid universitetet i St. Andrews, Skotland.

»Latinet var det civiliserade Europas forna språk och talades av människor av alla nationer. Redan nu har det visat sig nödvändigt, att få i världen ett nytt språk, fullt och klart förstäligt för människorna — något, som skall göra det möjligt för japaner att förstå ryssen och vice versa, och för kinesen att förstå dem båda och alla. Problemet att skapa ett internationellt hjälpspråk har sedan mer än 200 år sedan trängt sig på mänskligheten. Av alla försök att lösa detta problem har esperanto bäst lyckats i kampen för tillvaron. Känslan av sympati och samförstånd mellan esperantister är ett utmärkande drag hos esperanto. Språket är icke blott en utmärkt övning för tankeförmågan, utan väcker även sympati på ett praktiskt sätt. Esperanto kommer att bli allt mer och mer nyttigt för vetenskapen.



**Bär Esperantostjärnan!**

## Ondoj.

De K. A. Nikander.

«Mitt liv är en våg,  
som röres en tid.»

La vivo, la mia  
Jen ondo en movo  
Dum forte ĝin skuas  
De ventoj ekblovo.

Sed jen kvietigis  
La maro momente;  
La ondo ĉe l' bordo  
Ekdormas silente.

Ĝi kuŝas trankvile  
Sin kvazaŭ ne movas,  
Kaj tamen ĝi vibras  
Kaj tie sin trovas.

La ondo, guteto  
En maro de l' mondo,  
Ĝi ankaŭ rebrilas  
Per ora sunrondo.

El »Parmaso de popoloj»  
de Antoni Grabowski.



## Monologo.

Esperanto estas en juneco; mi en infaneco mia

Ni ambaŭ komencas; kredeble ni alvenos al nia difinita loko.

Ĉiu komenco estas malfacila, sed, komenco bona, laboro duona.

Ankaŭ tagiĝo estas komenco, sed kiel ĉarma!

Ĉe ĝia alveno la floroj ekfloras kaj ellasas siajn odorojn, la birdetoj kantas plej harmoniajn kantojn, la blanka ŝaŭmo bele kontrastas la bluan maron, nuboj prenas ruĝon, aero aromatiĝas, kaj la tuta naturo gaje ridetas la novan tagon.

Mi kreskas kaj trovivos mian destinon, ĉu edzine, ĉu malahine, aŭ tiel, kiel la sorto volos.

Esperanto nepre disvastiĝos; venkos siajn homajn obstinojn, barojn siajn, kaj faros el ĉiuj homoj en la mondo *unu grandan rondon familian*.

Originele verkis: *Antono Montesinos*.

El »La suno hispana».



## Pri telefonkontaktoj

ŝercas jene verkisto, kiu ofte estis ĝenata de telefonabonantoj, kiuj deziris aliajn numerojn:

Virino sonoris kaj demandis: — Ĉu estas tie ĉi, kie ĉambro estas luebla?

— Jes, estas tie ĉi.

— Kiel multe kostas pomonate?

— Dekunu milon da kronoj!

— Dekunu milon da kronoj! Tio ne estas malmulte. Tiam ĝi devas esti bela ĉambro?

— Jes, certe. Estas malgranda kaj bela ĉambro.

Finsonoro.

Post momento demandis la sama virina voĉo:

— Ĉu estas tie ĉi, kie ĉambro estas luebla?

Mi ŝanĝis la voĉon:

— Jes, estas tie ĉi.

— Kiel multe kostas pomonate.

— Unu kronon kaj sepdekkvin oerojn.

— Ĉu kostas unu kronon kaj sepdekkvin oerojn nun? Kostis ja dekunu milon da kronoj antaŭ kvarono da horo. Vi ne devas kredi, ke mi ne rekonas vian voĉon.

— La ĉambro estos pli malkara, ĉiu pasantan minuton. Finsonoro!

Iom pli malfrue demandis vira voĉo:

— Mi vidis anoncon en la gazeto pri ĉambro, kiu estas luebla. Kiom ĝi kostas?

— Kostas tridek kronojn monate, sed tiam vi mem devas prizorgi noktoĉemizon kaj dentobrosilon kaj pomadon. Loĝis viro tie ĉi antaŭe, kiu ĉiam volis prunti tiajn artiklojn, sed estis tre maloportune en la daŭro.

Nun la demandinta voĉo ricevis ĝenitan tonon.

— Ĉu vi staras tie kaj mokas min?

— Jes tion mi faras, mi respondis trankvile kaj honeste.

Post momento knabino sonoris kaj diris:

— Ĉu vi estas bonvola alporti la malplenajn bierobotelojn ĉe la familio Stelfolio en numero sesdektri Karlabergs vojo?

— Ne, tion mi ne volas.

— Ĉu vi ne volas? Kial?

— Tial ke tio ĉi estas la adjutantĉambro de la reĝa moŝto, kaj tie ĉi ni havas alion por pripensi ol ĉirkaŭkuri kaj alporti botelojn. — Honesta finsonoro.

Post du horoj la inferaparato ree sonoris.

Mi respondis »hallo!» kaj voĉo diris:

— Ĉu vi estas preta nun?

— Jes, mi estas! mi respondis.

— Mi do venos, diris la nekonata voĉo, kiu aŭdeble apartenis al juna virino.

— Jes faru tion, mi diris. La knabino eble estis bela.

— Mi kunprenas Kaĉjon, diris la voĉo.

— Jes, permesu al Kaĉjo kuniri, mi respondis, ĉar mi ne scias, ke mi estis malamiko kun iu, kiu estas nomata Kaĉjo.

Ŝi finsonoris.

Post duonhoro ŝi ree sonoris.

— Kial vi ne venas? Kiel longan tempon ni restos tie ĉi kaj atendi? Kaĉjo malvarmiĝas.

— Frotu do liajn piedojn per Karmol kaj lasu lin poste fari piedfingran gimnastikon. D-ro Lindahl rekomendas tian faradon.

— Kio estas via opinio? Ĉu mi starus tie ĉi sur la placo de Gustaf Adolf kaj froti liajn piedojn per Karmol. Kaj kiu estas D-ro Lindahl?

— Li estas ĉefkuracisto ĉe la idiota hospitalo en Ramschatka kie oni kuracas ĉiujn klientojn per Karmol kaj piedfingra gimnastiko. Kunprenu la knabon kaj eniri al la orvendisto Andersson tie, mi kredas, ke vi povas esti sola momenton por prizorgi la etulon.

— Mi ne komprenas, kion vi diras. Ĉu vi drinkis? Via voĉo estas tre mirinda.

— Jes tion mi faris, mi respondis. Mi enŝtopis en mi tri grandbotelojn da viskio, du litrojn da brando, ses duonojn da punĉo kaj gargaris ĉion per dekkvar boteloj da biero kaj kelkaj boteloj da ĉampano. Sed tio ne efikis ion. Mi estas egale sobra kiel la tagon kiam mi estis naskata. Nun mi manĝos sardinon kaj rafaneton kaj drinkos du botelojn da konjako.

— O-O-Oohh! Tio ĉi estas bedaŭrinda. Nun mi devas konstati, ke mia patrino ĉiam antaŭdiris vere, ke vi fine falus. Mi mendos aŭtomobilon kaj hejmvemas tuj.

— Jes, venu vi, mia karulino, la konjako kuŝas sur glacio, mi respondis.

Mi neniam poste aŭdis ion de la preparolita virino. Sed mi esperas, ke ŝia edzo aŭdis anstataŭe.

La telefona asocio nun riparis mian telefonon.

Tradukis el la sveda

E. Adamson.

## Kiu li estis.

Angla tabakkomercisto, kiu prenis sur sin malnovan komercon, spertis amuzan okazon.

La unuan vesperon, kiam li malfermis la magazenen, malbone vestita viro, ĉirkaŭ 65-jara, envenis en la magazenen, iris al la cigarbrulilo kaj ekbruligis malpuran argilpipon. Post kiam li elfumegis nubon de malbonodoranta fumo, li eliris, ne aĉetinte ion kaj ne dirinte ian vorton.

La tabakkomercisto ĉagreniĝis ion pri la familiara konduto de la viro, sed supozis, ke la viro estis konatulo al la antaŭa posedanto kaj eble ne sciis, ke la komerco estis transdonita. Sed kiam la malgranda maljunulo venis ĉiuvespere kaj ekbruligis sian pipon la komercisto tamen opiniis, ke tio estis tro multe, kaj unu vesperon li starigis sin antaŭ la pipbruliganton, kiam tiu ĉi estis ekironta.

»Kiu vi estas?» li demandis.

»Oh!» diris la malgranda maljunulo konsternata, »ĉu vi ne scias, kiu mi estas?»

»Ne, kiel mi povus scii tion?» siblis la komercisto.

»Sed vi nun almenaŭ devas koni min,» estis la respondo, »mi estas tiu persono, kiu envenas ĉiun vesperon kaj ekbruligas mian pipon.»

Tradukita de

K. Rosengren.



## Resan genom Sverige.

En del, om också blott ett fåtal, av de esperantistoj, som befundit sig bland de tusenden som genom Sverige sökt sig väg till sina hem på andra sidan Östersjön, ha icke oron och förvirringen lätit hindra sig ifrån att begagna sig av esperantostjänster. Det är då först och främst Världs-Esperantoförbundets vice »delegito» (ombud) i Stockholm, som haft största kännningen av besöket, men även på andra platser, t. ex. Gävle ha esperantisterna haft tillfälle att visa meningsfränderna betydliga tjänster. I sista numret av den ryska Esperantotidningen »La ondo de Esperanto skriber en av dessa »samideaner»,

## Kafé Linnéa

(Nykterhetsvännernas Kafé)

NYGATAN 34 - (Pousettska huset)

TELEFON 859

Frukostar, Middagar och Soupéer. Smörgåsar, Kaffe, The o. Choklad m. m. Beställningar för mindre sällskap.

LOVISA HÖRLIN.

Skandinavoj kiuj havas konatojn en Ameriko, estas petataj admoni ilin skribi al Skandinava Esperanto-Instituto, Rockford, Ill. U. S. A. por ricevi informojn.



## Getle Esperantoförening

avhåller ordinarie månadmöte tisd. den 1 Dec. 1914 kl. 8 e. m. å lokalen S. Kungsgatan 8

*Wold Mikli*, Reval, följande om sin resa genom Sverige: — »Nästa dag anlände sällskapet till Stockholm, varifrån det snart medelst ångbåt skulle avsesa till Raumo. Samlade på däck, väntade alla varje ögonblick på avresan, men kaptenen meddelade, att han icke skulle fara; han önskade icke bli tagen till fånga. Det började en vandring till stationen.

Jag besökte »vic-delegito'n» på platsen. Meningsfränderna i Stockholm ha icke tagit miste då de valde sin »vic-delegito». Så vältaliga, hjälpsamma och vänliga skulle alla vara!

På kvällen gick tåget längs Bottniska Vikens kust till Luleå. Man reste utan alla bekymmer, ty vid nästan varje station mottogo oss de omtänksamma svenskarna och undfägnade oss gratis med té, mjölk och bröd. Dessutom sörjde de i Luleå hamn, för varma kläder, så att vi icke skulle förkyla oss under sjöresan! Alla uttryckte sitt innerliga tack till det neutrala, sympatiska folket för dess minnesvärda hjärtgodhet.»



## HERRAR

ekiperar sig bäst och fullständigast hos

### Axel Lidholm

Drottninggatan 30 - - GEFLE

## Josef Wikströms

Tobakshandel

GEVALIAPALATSET - GEFLE

## SKODON

Största sortiment hos

A. M. Zimmerman & C:o



## La Espero

utgives av Gefle Esperanto-förening och utkommer omkr. den 15 i varje månad.

Lösnummerpris 10 öre.  
Prenumerationspris Kr. 1: 20.

Prenumeration kan ske dels direkt hos tidningens expedition, Gefle, dels genom återförsäljare eller på posten.

Återförsäljare önskas på varje plats! Provision om flere exemplar tagas!

Prenumerantsamlare erhålla 20 öre för varje anskaffad prenumerant, om minst 5 prenumerationsavgifter insändas samtidigt.

Abonprezo ekster Svedujo 1:00 Spesmilo. (12 numeroj).

Specimeno kontraŭ respondkupono. Mendo ĉe R. Pehrsson, 3-23, Gefle.

## Ozarowsky & Pehrssons

Bleck- & Plåtslageri

N. Kopparslagaregatan 15, Gefle

o TELEFON 188 o

Kiam vi bezonas viandon, mendu ĉe

FRANS A. OLSON

Telef. 34 □ GEFLE □ Telef. 34

## Central- och Jernvägshotellen

GEFLE

REKOMMENDERAS!

## C. J. LINDH

BOK- & DISTRIBUTIONSÄFFÄR

S. FÄLTSKÄRSGATAN 19, GEFLE

\*\*\*\*\*

Rekommenderar sig vid behov av Böcker, Tidskrifter och Häftesarbeten.

\*\*\*\*\*

RIKSTELEFON 16 97.

## PROVU LA KOPIOKRAJONON ESPERANTO!

3:— kr. por dekduo. 30 oeroj por unu.

W. WAHLUND, GEFLE

## Wickmans Kappaffär

NORRA KUNGSGATAN 7 - GEFLE  
Vid Rådhusplanaden.

Kappor o. Promenaddräkter i stort urval.  
Beställningar emottagas o. utföras förstklassigt.

RIKSTELEFON 1391.

## Gust. Holms Förstoringsanstalt

Brunnsgatan 78, Gefle. •• Rikstel. 16 28.

Utför förstoringar efter fotografi.  
Förstklassigt arbete. Begär prisurant.



## N. Lundgren

GEFLE - Interurba tel. 151

## Kamentuboj por fabrikoj.

Pli ol 750 konstruitaj.  
Riparoj dum uzado.

Fulmkonduktiloj estas muntataj.  
Propra brikejo en Upsala.  
Plej granda firmo por konstruo de fabrikoj kamentuboj en Skandinavio.

Arĝenta medalo en Stockholm 1897  
, , , Gefle 1901  
, , , Norrköping 1906

## Presenter inköpta hos

Juvelerarefirman

A. U. Wahlberg, Gefle

äro alltid välkomna.

Filial i Bollnäs.

## LECIONOJN de Itala, Latina kaj Portugala Lingvoj per Esperanto

kaj aliajn interesajn fakojn publikigas la internacia duonmonata revuo "L' ESPERANTO".

Jarabono Fr. 3.25 (Sm. 1.300)

Kolekto 1913 (1:a Jaro) enhavanta 21 lecionojn de Itala lingvo Fr. 2 (Sm. 0.800)

Specimenon kontraŭ respondkupono.

Konto ĉe la Ĉekbanko Esperantista — London.

Sin turni al eldonisto

A. PAOLET - S. Vito al Tagliamento (Italujo)

Abonejoj ĉe ĉiuj Librejoj kaj Esperantaj Gazetoj.

Från

La Esperos expedition, Gävle,  
kan rekvireras:

Läroböcker:

Lärobok i Esperanto av G. H. Backman	1:—
Lärobok i Esperanto av P. Nylén	1:—
Lärobok i Esperanto av Carl Ohlsson	0: 50
(Alla med Esp.-svensk ordlista).	
Esperanto-språklära av O. W. Hjærtstätt	0: 40
Esp.-svensk och svensk-esp. ordbok av O. W. Hjærtstätt	0: 60
Svensk-esp. ordbok av E. L:son Finn	1: 50

Sveda Kantaro, kun melodioj 0: 35  
Esperantista Kantaro, » 0: 75

Nova Testamento (afrankite)... 2: 50

Esperanto-stjärnor	0: 75
Esperantoflagga (bordsflagga)	2: 40
d:o (nägot enklare)	1: 75
d:o (mindre)	0: 85
d:o d:o	0: 50
d:o (miniatyr)	0: 15
10:e världs-Esperantokongressens officiella vykort. 1 duss.	
1:— kr.	1 st. 0: 10
d:o reklammärken, 100 st.	
1:— kr.	1 st. 0: 02

## Finna Esperantisto

Officiala monata organo de Esperanto-Asocio de Finnlando. o Abonprezo 3:— Fmk.

Adreso: S-ro Albin Sandström, 11, Köpmansgatan, Helsingfors.

